# ĈU ANKORAŬ EBLAS ESTI KRISTANOJ?

## Intervjuo kun Follereau

**Raoul Follereau « la vagisto de la bonfareco » skribas: « En ĉi tiu jarcento, kiu rapide foriras hezitema inter malplenaj kaj satmanĝintaj ventroj, la kristano estu semanto de amo ».**

* * *

*DEMANDO. Komuna diro asertas, ke nia mondo travivas nuntempe radikalan transformiĝon; ŝajnas ke la progreso de la sciencoj kaj de la konoj forrabas spacon al la mistero kaj al supernatura. Ĉu tiu evoluo estigas diskuton pri la kristana kredo?*

Ho, tute ne. Ĝuste kontraŭe!

Nenio kaj neniu malpermesas al la homo esplori la mondon de Dio kreita por li. Ĉiu « elpensaĵo » konigas novan aspekton de la kreo, de ĝia ordo, de ĝia grandeco. Do, de la povo kaj de la grandiozo de la Kreinto. Ĉiu venkita mistero naskas novan mirindaĵon.

« Renversigi Dion: kia venkego! Anstataŭigi Dion: kia feliĉega estonto »! diradis Berthelot la pasintan jarcenton. Neniu hodiaŭ kuraĝus repeti tian pretendeman absurdaĵon. Fakte multaj el la plej gravaj sciencistoj en la mondo estas kristanoj. La plejmulto kredantoj. Tio estas ĉar je la fino de ilia vojo senhava sed pasiiga, ili malkaŝas aŭ intuicias Dion, tiun Dion ilin atendantan de ĉiam.

* * *

*DEMANDO. Ankaŭ la katolika Eklezio estas submetita al la kunresponDeca ludo, al la transformiĝoj, al la diskutoj. Ĉu vi vidas en tio kaŭzon de spirita malklereco aŭ motivon de pli profunda fido?*

La Eklezio situas en la mondo. Por pli bone gvidi ĝin, ĝi devas pli bone ĝin koni. Plie, en ia senco, eĉ ĝin speguli. Sekve ĝi ne povus plene eviti ĝiajn ŝanĝojn kaj postulojn. La « diversaj movadoj », ofte iom konfuzaj, skuantaj la Eklezion, estas vivipovaj signoj portantaj en si la ĝermon de grandaj esperoj. Nur ke la esenco estu zorge gardata. Ne temas pri doni al Dio la aspekton de nia jarcento sed, precipe, oferi al nia jarcento la figuron de Dio. Do, oni povas esti kristano sen esti katoliko. Tion evidente pruvas la Sankta Seĝo, kiu vaste akceptas, frate, ĉiujn, kiuj predikas kun egala fervoro la saman Evangelion, eĉ se apartenantaj al diversaj kredodoktrinoj.

Ni respektas kaj amas ilin. Sed kiu pretendas proklami sin katoliko, filo de la romia Eklezio, akceptu la esencajn strukturojn kaj, precipe, la aŭtoritaton de Petro, simbolo kaj ilo de kunteniĝo de ĉi tiu Eklezio.

* * *

*DEMANDO. Kiamaniere, laŭ via sperto, vi sukcesus prezenti la portreton de la kristano de la « jaroj '70 » kaj skizi la konkretojn rezultojn de lia aparteno al la Eklezio?*

Antaŭ kelke da jaroj Papo Pio XII min akceptante en Castelgandolfo, jene parolis al mi: « Nepre necesas de nove lernigi al la homoj la veran, reciprokan amon ».

Ĉu pli mirinda moralintruo? Kristano estas kiu amas, kiu sincere fervore asertas: « Neniu rajtas esti feliĉa tute sola »; kaj klopodas proprekzemple kaj per sia faro humila, persistema, ĉiutaga, ke ĉirkaŭ si estu iomete malpli da sociaj maljustaĵoj, da mizeregoj, da angoroj.

En nia jarcento, kiu rapide foriras hezitema inter malplenaj kaj satmanĝintaj ventroj, la kristano estu semanto de amo.

Péguy diradis « Kiu ne etendas la manon, tiu ne estas kristano ». En 1929 al ĵurnalisto, kiu en Rio de Janeiro min demandis, kion signifas por mi « kristana civilizacio », mi respondis: « La kristanismo estas la revolucio pere de la bonfareco ».

Jam 40 jaroj forpasis. Nenion novan plie mi havas por aldoni.

*Traduko de Prof-ino Norma Dell'Aringa*

*el Mantova (Italujo)*

## Paŭlo VI kaj la ortodoksa delegacio.

Dum la semajno de preĝoj por la unueco de la kristanoj ortodoksa delegacio, kiun gvidis la metropolito Melitono, vizitis la Papon en Vatikano. La metropolito donacis al Paŭlo VI ekzempleron de la libro Tomos Agapes senditan de la Patriarko Atenagoro kun lia dediĉo kaj entenantan kolekton de dokumentoj interŝanĝitaj dum la lastaj 12 jaroj inter Konstantinopolo kaj Romo.
En la laterana baziliko okazis solena ceremonio ekumena, en kiu partoprenis kun la ortodoksaj delegitoj la Sankta Patro, sep kardinaloj multaj episkopoj, sacerdotoj kaj fideluloj.
Kortuŝanta estis la momento, kiam Paŭlo VI ĉirkaŭbrakis la metropoliton de Kalcedonio Melitonon. La Papo parolis pri la granda valoro de la unueco kaj ĉiuj preĝis por tiu granda celo.

## Atenagoro, profeto de la unueco.

La tutmonda gazetaro, la libro de Olivier Clément « Dialogues avec le Patriarche Athénagoras » kaj pluraj intervjuoj donas al ĉiuj la eblecon koni Atenagoron, la profundecon de lia animo kaj la riĉecon de liaj pensoj. Tamen kiu konas lin de proksime havas la impreson aldoni ĉiam ion. Oni povas diri, ke Atenagoro estas la prototipo de la Orienta Eklezio; sed vidante en li unu el la plej grandaj figuroj de la nuna tempo, oni povas ekvidi en li la simbolon de la kristanaro suferanta pro la jarcentaj dividoj kaj sopiranta la perfektan unuiĝon.

Li estas unu el la nuntempaj figuroj, kiuj jam apartenas al la historio. Sed li apartenas al ĉiu homo. Li estas aparte proksima al la suferantoj kaj al tiuj homoj, en kiuj li vidas fajreron de sia vokiĝo al la unueco. Tiu ĉi komuna intereso incitis lin voki min al Istambulo antaŭ malmultaj jaroj, ĉar li sciis, ke mi laboras kun la « Movado de la familioj por la ekumenismo ». Tio okazis junie 1967. Li akceptis min, kiel se li estus min koninta ĉiam. « Mi atendis vin », li diris kaj volis ke mi rakontu la kontaktojn de la movado kun luteranoj kaj anglikanoj, Poste li komentariis: « Ni vivis izolitaj sen fratoj, sen fratinoj, kiel orfuloj. La unuaj dek jarcentoj de la kristanismo estis por la dogmoj kaj la organizado de la Eklezio. Dum la dek jarcentoj sekvintaj ni havis la skismojn,, la dividon. La tria epoko, ĉi tiu, estas la epoko de l'amo ».

Li petis ke mi revenu en Istambulon. Mi iris tien ĉiujare. Li parolis interalie pri siaj renkontoj kun

la Papo kun granda emocio. Li diris: « Estonte mi ne nomos la du Ekleziojn katolika kaj ortodoksa, sed Eklezio de la okcidento kaj Eklezio de la oriento. El ĉie ni vidas ekumenan movadon. La ŝtatoj eliras el siaj limoj kaj serĉas interkomprenigôn; ankaŭ la eklezioj eliras el siaj limoj kaj deziras ĉi tiun novan renkontiĝon, kiu estas la natura renkontiĝo de la Eklezio. La Papo estas nia *leader*, nia estro. Kelkfoje mi vidas en li agoniantan homon, ĉar li bone scias ĉion, kio estas negativa en la mondo. Kaj tial mi proponis al mi oferi al la Papo mian servon centprocente.

Mi sekvas, amas, komprenas, respektas, admiras lin. Li scias, kion li devas fari, kion li volas, li estas forta.... ».

*Klara Lubich*

## Ekleziaj tendencoj en Svislando

Malprave oni opiniis, ke la « silenta plimulto » de svisaj katolikoj estas konservativaj, tradiciemaj. La svisa revuo « Treffpunkt » (eldonkvanto: 25.000) enketis siajn legantojn. Respondis plejgrandparte la tiel nomataj « praktikantaj » katolikoj, plenkreskuloj (90 %); junuloj ĝis 20-jaraj respondis nur 3,8%. Malgraŭ tio ke plenkreskuloj ordinare estas pli konservativaj ol junuloj, la respondoj estas grandnombre progresemaj: 78,9% aprobas la rezultojn kaj konsekvencojn de la Dua Vatikana Koncilo. Ili rifuzas limigon de la eklezia aktiveco al nure religia kaj spirita tereno kaj deziras eklezian agadon por mondaj problemoj. 60,8% akceptus edziĝintan sacerdoton; 25,5% malakceptus lin. 51,7% opinias, ke la eklezio forigu la leĝojn kontraŭ diverskonfesiaj geedziĝoj. 66,5% malaprobas la disciplinon, laŭ kiu katolikoj, kiuj geedziĝis kontraŭ eklezia leĝo, ne rajtas ricevi la sanktan komunion. 52,1% opinias, ke la eklezio permesu en certaj cirkonstancoj la re-edziĝon de eksedziĝintoj.

La respondintoj deziras respondecan aktivecon de laikoj en ekleziaj aferoj. 54,2% akceptus laikan viron, 44,3% laikan virinon kiel predikanton en preĝejo. 49,8% deziras, ke la katolikoj pliintensigu ekumenajn rilatojn. 86% estas kontentaj pri la liturgiaj reformoj. 45,1% deziras firmigon de la papa aŭtoritato, 52,3 tiun de la episkopa kaj 41,2 tiun de la paroĥestra aŭtoritato. Sed 73% deziras pli grandajn kompetencojn de la laikoj kaj 82,7% deziras, ke virinoj havu rajton kundecidi en ekleziaj aferoj.

Tamen ankaŭ en Svislando aktivas ekstreme tradiciemaj katolikoj, kiuj akuzas episkopoj kaj la papon pro tio, ke ili forigis la latinan liturgion kaj kripligis la mesliturgion. Kelkaj eĉ asertas, ke la papo staras sub influo de la framasonoj. Eĉ la nova « kontraŭpapo » Klemento trovas siajn disciplojn en Svislando — signo de sektema konfuziĝo.

La svisaj episkopoj enketis la sacerdotojn pri multaj problemoj

de la sacerdota ofico. La sacerdotoj povis anonime respondi. Interesaj estas la respondoj rilate la celibaton. 29% de la respondintoj opinias la celibaton nepre necesa, 44% opinias ĝin dezirinda, 5% opinias ĝin sensignifa. 76% respondas, ke la celibata vivo por ili ne estas peza, 18% respondas, ke por ili ĝi estas peza, 4% respondas ke ĝi estas tre peza. 66% opinas, ke en kazo de neceseco estus oportune ordini ankaŭ edziĝintajn virojn. La episkopa sinodo en Romo decidis rekomendi al la papo, ke li ŝanĝu nenion de la celibata leĝo.

*W. Flammer*

---

## ĈU LA GREGORIA KANTO MALAPEROS?

La oficiala kaj tradicia kanto de Eklezio estas la Gregoria kanto, unue reguligita de Sta Ambrosio kaj poste de Sta Gregorio (la esprimo « Gregoria Kanto » ŝajnas preferinda ol la vorto « ĉanto », tamen trovebla en kelkaj vortoj). Ĝis nun, tiu altnivela kaj solena kanto estis nedisigeble ligita kun la latina lingvo, oficiala esprimilo de la Katolika Eklezio ĝis la Koncilo Vatikano IIa.

Sed, obee al la decidoj de tiu Koncilo, la latina rapide malaperas de ĉiuj liturgiaj cerimonioj, profite al la naciaj lingvoj kaj ankaŭ al Esperanto; tio signifas, grandan danĝeron por la Gregoria kanto, kies risko estas ne postvivi la malaperon de la latina! Se tio definitive okazus, estus netaksebla perdo por la arta kampo! Tiel belaj kaj admirindaj estas la Gregoriaj melodioj!

Antaŭ danĝero, la katolikaj esperantistoj povas — kaj do devas — reagi kaj tuj nun, klopodi por adapti la oficialajn Gregoriajn melodiojn al la lingvo Esperanto. Al la interesatoj en tiu afero ni proponu:

a) Starigi Komisionon por tia adaptigo. En tiu komisiono devos partopreni Pastroj (por sekurigi perfektan tradukon en Esperanton de la oficialaj tekstoj) kaj Muzikistoj sufiĉe kompetentaj pri Gregoria Kantarto.

b) Laŭ specigi la tradiciajn himnojn kaj tekstojn de Eklezio ĉar povas esti, ke pro la postkoncila evoluo de la liturgio, kelkaj el ili ne plu estas uzataj kaj malaperos el la kantlibroj.

c) Komenci la adaptigon ĉe du aŭ tri difinitaj tekstoj kaj poste, daŭrigante ĝis tiu kompreneble tre vasta laboro estos ĝisfine plenumita. Ŝajnas, ke la plej urĝa tasko estus adapti la Mesajn tekstojn al la ĉefaj Gregoriaj melodioj, por ke en la solenaĵoj, oni povu kanti Gregorie kaj Esperante.

Ĉiŭ povos kompreni kiel vasta estas la ĉi supre proponita programo, sed tamen iam en la estonteco, ĝi montriĝos nepre utila, ĉar en ĉiuj landoj, oni povos tiam denove aŭdigi la Gregorian kanton nek en la latina nek en la naciaj lingvoj, sed en Esperanto, kiu tiel fariĝos pli kaj pli kvazaŭ liturgia lingvo!
Jen kelkaj ideoj kaj proponoj! Kun ĉies helpo, ĝi povos fariĝi realaĵo.

*A. Ribot*

---

## « POR KONSTRUI LA PACON, DONU LA PAROLON AL LA INFANOJ! »

Ankaŭ la infanoj parolos dum la II-a Foiro Internacia de Arto Infana 1972 en Bologno, Italujo, ĉar la eksponontoj temos pri « Lo paco kaj la frateco inter la popoloj ».
Jam la I-a Foiro Internacia de Arto Infana 1971 en Bologna trovis unusone bonegan eĥon en la informaj organoj: Radio, Televido, Gazetaro kaj inspiris tial la iniciintojn de la entrepreno al la adiaŭa saluto: « Ĝis revido je la II-a Foiro Internacia en Bologna jam la venontan jaron! » La temo de la pasinta eksposicio estis « La Biblio ». La temo por 1972 estos « *La paco kaj la frateco inter la popoloj* ».
La invitantoj esperas, ke la geknaboj ne en sia eco kiel artistoj, sed kiel infanoj povos inicii, entuziasmigi, purigi kaj korekti la optikon kaj spiriton de la plenkreskaj artistoj rilate la ĉiamajn problemojn de la mondo: La paco, la milito, la vivo, la morto, la espero, la ĝojo.
Al la infanoj, kiuj volas partopreni, iras la alvoko: « Geknaboj, ŝajne la homoj ne kredas multe al tiuj, kiuj admonas, esti kontraŭ milito, potenco kaj ekstermigo de la humana generacio. Ili ne volas aŭskulti sanktulojn, nek filosofojn, nek sciencistojn. Al ni restas nur unu espero: ke la homoj aŭskultos vin, ĉar vi kapablas eldiri la aĵojn kiel se estus la unuan fojon, ke la mondo aŭdus pri ili. Vi, la estonteco de la mondo, vi konvinku nin, ke la milito estas la plej malbona malbonfarto kaj la plej granda stultaĵo. Diru al ĉiuj, ke nur la paco povas savi la esperon, la justecon, la bonfarton en la homaro.
La temo direktas sin ne lastavice al la autoritatuloj: « *Por konstruj la pacon, donu la parolon al la infanoj!* ».
Certe, la infanoj ne seniluziigos nian atendon. Kontraŭe, ili donos al ni novan vizion de niaj problemoj kaj respondecoj. Pro tio ni donu humilan aŭskulton al la infana dono de la vero kaj klaro, per kiu la naturo dotis la infanojn, kaj la spirito kapabligas la infanojn, transmeti ĝin al ni sen mallumo kaj sen malbonvolo.

Ameriko konstruas radioteleskopon kun 30.000 antenoj, por enkapti eventualajn sonojn el mondoj distantaj de nia planeto ĝis cent lumjaroj. Kial ne formi ion pli humilan, sed tamen pli necesan kaj sukcesplenan pere de Internacia Art-Eksposicio de la infanoj? Por enkapti tiel la voĉon, animon, fantazion de la tutmonda infanaro! Ĝis nun ni plenkreskuloj volis nur decidi pri la infanoj, sed neniam aŭskulti ilin. Ni donu la parolon al la infanoj, diras la invitantoj al la EXPO 1972 en Bologna, por ke la infanoj helpu nin, esti homoj respondecplenaj por la vivo kaj feliĉo de ĉiuj, individuoj kaj popoloj! Tia infaneco, vere profeta ne konscia pri tio, estas la plej senegoisma deponaĵo por la voĉo de la naturo kaj pro la Dia volo.

(Kompilta el la « Notiziario dell'Antoniano », Julio 1971, Bologna, It., kaj tradukita en Esperanto de)

*P. Bruno Hebenstreit O.F.M.*

---

*P.S. Dezirante precizan Sciigon pri la kondiĉoj de partopreno mendu la « Bando della Mostra 1972 ».*

*ĉe: MOSTRA INTERNAZIONALE*
*DI ARTE DEI RAGAZZI*
*Antoniano*
*— I — 40125 Bologna (Ital.)*

---

## LA LEGANTOJ SKRIBAS

**Dr. J. Kondor (Germanujo):**

Koran dankon pro la novformata EK! La revuo aspektas bele kaj ankaŭ la enhavo estas riĉa, interesa.
Nur la preseraroj ĉagrenas min. La Tuinder-artikolo kaj la aldonaĵo pri la kondiĉoj de la laboro precipe plaĉas al mi. Ankaŭ la spritaj anekdotoj-rakontetoj kaptas mian atenton.
Pri radio-elsendoj: La pola radio estas bonege kaptebla, same Radio Pekino. Bern-Romo tute ne estas kapteblaj nun.
Ĉu la Vatikano elsendos en Esperanto?
La « ruĝa papo » (Mao) de oriento favoregas Esperanton, espereble nia okcidenta Papo ne silentos.
La indianoj estingas fajron per fajro: kiel ne agas ankaŭ ni simile? La ruĝaj sendiaj ideoj povas esti kontraŭbatalataj inde kaj efike de la Vatikano per Esperanto.

**J. Zilonka (Pollando):**

Mi ricevis la lastan-junuaron-n-ron de EK kaj tralegis ĝin senspire. Me bedaŭras, ke ĝi finiĝis. En la « respondo al kritikoj » mi vidas viajn malfacilaĵojn en

l'aperado de la revuo. Via laboro estas vere peza. Mi kunsentas kun vi: la legantoj ne devus miri, se leteroj aŭ artikoloj estas tondataj. Tion faras ĉiuj redakcioj. Bonvolu esti pacienca kaj indulgema kun viaj legantoj: ĝis nun neniu naskiĝis kiu al ĉiuj plaĉis.

Laŭ mi ne gravas scii, al kiuj nacioj la skribantoj apartenas: nur gravas ke la enhavo estu internacia kaj valora.

## Korry Van Kleef (Nederlando).

**Ni publikigas nun la unuan parton de ŝia letero.**

**Faktoj el 1971, pri kiuj ni legis kaj ne legis en E.K.**

**Nia organo « Espero Katolika ».**

Estas bone rerigardi al tio, kion 1971 liveris al nia unuiĝo. Unue ĝi donis novan prezidanton de IKUE kaj alian redaktoron de EK. Due oni dum la jaro ricevis aliforman E.K. kun drasta malpliiĝo de paĝoj; en 1970 E.K. aperis entute en 240 paĝoj kaj komune kun « Dia Regno » en 20 paĝoj. Entute ja: 260 paĝoj. En 1971 E.K. entute enhavis 152 paĝojn, el kiuj 56 enkoraŭ estas redaktitaj de Stefan Maul en la unua kvarono de la jaro. Do la membroj ricevis **pli ol cent** paĝojn malpli ol en 1970. Sed ĉiuj ĝojas laŭ la lastaj numeroj, ĉar la enhavo estus pli bona; ĝi almenaŭ estas « korekto de la devojiĝo de tiu revuo » kiel la hispanoj asertas sur p. 144. Vere estis hispanoj kaj ne rusoj, kiuj diris tion, kvankam tia eldiro estus tute laŭ la komunisma doktrino, laŭ kiuj oni ankaŭ korektas homojn de certaj devojiĝoj. Ĉu la katolika Eklezio certgrade havas saman sistemon?

Sur diversaj paĝoj oni povas regule legi ion malagrablan kontraŭ la estinta estraro kaj redaktoro, kiuj certe faris grandan impreson, ĉar ĝis en la decembra numero oni povas trovi tiajn pikojn. La nova redaktoro plendas pri « la peza laboro por gajni la menbrojn forlasitajn IKUE ». Sed kontraŭ tio mi volas protesti. Li sugestas, ke dum la lastaj jaroj la membroj forkuris el IKUE en amasoj, sed tio ne estas vera. Mi tiam havis la administracion kaj tio montras, ke ekd 1966 ĝis 1970 la tuta membro-nombro eĉ kreskis de 909 al 1089 sen duoblaj kaj interŝanĝaj abonoj.La meza aĝo de la membroj estas alta kaj la plejmultaj eksiĝoj okazis pro morto. Ŝajne oni sendas nun numerojn ankaŭ al mortintaj membroj opiniante ke ili eksiĝis el protesto kontraŭ la enhavo de E.K. Mi almenaŭ ricevis leteron de sinjorino, al kies edzo, kiu mortis antaŭ kvar jaroj, oni nun denove sendas E.K.!! (sekvos)

* * *

La intereso de Sam-ino Corry Van Kleef por nia revuo estas laŭdinda, sed mi ne samopinias. Ŝi bedaŭras pro la « drasta malpliiĝo de paĝoj dum la jaro 1971 »; kun sama bedaŭro ŝi rimarkas, ke multaj « ĝojas, ĉar la enhavo estus pli bona » ol antaŭe; aparte malplaĉas al ŝi la « korekto de la devojiĝo de tiu revuo », ĉar ĝi estus laŭ la komunisma sistemo kaj metodo. Mi pensas, ke la legantoj vidis komunisman sistemon en la fortaj atakoj kaj mokoj kontraŭ la Papo, la Eklezio, la Episkopoj, la sacerdota celibato ktp. dum la lastaj jaroj kaj aprobis tiun korekton. Ankaŭ tiu devoijĝo kontribuis al « drasta malpliiĝo »: de membroj kaj konsekvence de paĝoj. Certe iuj membroj mortis kaj estas eble, ke la revuo estis sendita al mortintaj membroj, se neniu anoncis ilian morton. Estas bone, ke la

lokaj asocioj komuniku ĉiam tuj la morton de membro, kaj ke la samideanoj ŝanĝantaj lokon sciigu la novan adreson.
Kiel jam dirite, dependas de la tuta IKUE la reflorigo de la Asocio kaj la plibonigo de nia revuo.

**(La redaktoro)**

---

# VENTO POR NIA MUELILO

**Nederlanda pastro (Owendijk - NL):**

**Kiu estos la labora lingvo en la eŭropa ekonomia asocio?**

Estas konate, ke la eŭropa «volapuko» en la kunveno de la « 6 » estas la franca lingvo, kvankam la kvar oficialaj estas la franca, la germana, la itala kaj la hispana. En la ordinara uzo ĝisnun jes superregis la franca, ekz. se la tiamo nederlanda ministro de eksterlandaj aferoj Josef Luns volis esti bone komprenata. Tiel ĝis nun. Sed kio okazos kiam Anglujo estos enirinta en la eŭropan asocian? ĉu ĉiuj lingvoj — entute sep — estos rekonataj kiel oficialaj?
La praktikaj problemoj por la eŭropaj administracioj iĝus eksterordinare komplikaj. Ĉu forstreki plurajn lingvojn de la oficiala listo? Sendube Bergujo pro internaj kialoj kontraŭstaros la solvon. Kiuj estos la laborlingvoj? Certe la franca, la angla kaj la germana. Kiu el ili estos la plej grava? La privilegia skriblingvo estos la franca; sed kiun lingvon parolos la eŭropeanoj?
Jen aktuala pripensaĵo, kiu aperis en kanada ĵurnalo. Estus interese, ke la legantoj (almenaŭ iuj) esprimu sian opinion koncerne tiun ĉi problemon.

**Oowendijk**

---

La pastroj Josep Serra i Janer kaj Climent Forner, estas du elstaraj nuntempaj katalunaj poetoj, per kies verkoj ili prefere pretraktas, profunde kaj emocie, religiajn, mistikajn kaj sociajn temojn.
Ili ambaŭ verkis majstre du karakterizajn samtemajn poemojn, per kiuj estas prikantata intime, serene kaj kuraĝe la sacerdota celibato kaj la spirita patreco.

## Senĉesa vorto

La voĉo de neebla filo
rampas laŭ muroj de ombreca silento,
kruele sortobatite.

Mi ne posedas tritikon el amo
de mia surtera rikolto.

Hedero trista kaj amara
daŭre zonas cian kanton
fidele vekiĝintan apud la ombro
tiel obstina de miaj tagoj.

Estas neeble; ci ne plendu!

Ne ekzistas brakoj por cin levi
kiel trofeon, ĉielen;
nek parado de iuj vortoj
akompanantaj cian obstinan ĉeeston.

Silentu, mia neebla filo!
Mi ne posedas tritikon el amo
de mia surtera rikolto.

**Sac. Josep Serra i Janer**

# PRI KONKORDATO EN HISPANUJO

Ni volas fari skizan historion pri la reformo de la Konkordato en Hispanujo, ĉar tiu aktuala problemo estas origino de multaj kaj diversaj komentarioj.
La lasta hispana respubliko fakte nuligis la kontrakton, kiun subskribis en 1851 la Papo kaj la hispana Reĝo. Unu el la celoj de la civila milito estis la restarigo de la religiaj rajtoj. Pro tio en 1941 la hispana registaro kaj la Sankta Seĝo faris la unuan interkonsenton pri oficialaj rilatoj inter si.
En 1953 post tri jaroj de preparaj laboroj ambaŭ potencoj subskribis novan Konkordaton, kiu estis favore akceptita de civilaj kaj religiaj medioj. La revuo de Hispana Katolika Agado « Ecclesia » rekonis tiun kontrakton kiel « modela Konkordato inter la Sankta Seĝo kaj katolika Ŝtato en la XX° jarcento ».
La 8-an de Oktobro 1965 finis la II^a^ Vatikana Koncilo, kiu renversis multajn ideojn kaj principojn, kiuj estis konsiderataj ĝis tiam kiel veraj, en ilia intenco aktualigi la Eklezion.
En la hispana libro « Ĉio pri la Konkordato » oni povas legi: « Hodiaŭ, post la II^a^ Vatikano, kiam la Eklezio negocas Konkordaton ne serĉas interŝanĝon de privilegioj sed nur Statuton pri identeco en la civila socio, en kiu ĝi vivas kaj kun kiu ĝi volas kunlabori kun sendependeco kaj lojaleco por la plej bona servo al la Homo ». Ĉio ĉi tio faras ke la nuna Konkordato povas esti konsiderata kiel antikvaĵo, kiu ne respondas al la nunaj postuloj. Ĉar multaj artikoloj ne konkordas kun la koncila doktrino kaj eĉ kun propraj hispanaj Leĝoj, kiel okazas kun la unua artikolo de la Konkordato, kiu rekonas nura religio de Hispanujo la romkatolikan. Tiu aserto diskordas kun la posta hispana Leĝo pri religia libereco.
La rilatoj inter la Registaro kaj la Episkopaj Konferencoj, kiuj ekestis lastatempe, ankaŭ ne estas pritraktitaj en la Konkordato. Ankoraŭ estas multaj aliaj punktoj kiuj devas esti reviziataj en la Konkordato, sed la ĉefaj punktoj, kiuj okazigis gravajn diskutojn, enlande kaj eksterlande, estas la grandaj rajtoj kaj privilegioj de la Eklezio kaj la interveno de la Registaro en la elekto de Episkopoj. Pri ĉi tiu privilegio parolis klare la Koncilo kaj esprimis la deziron ke la Registaroj propravole rezignu tiun rajton. Post nelonge Argentino akceptis tiun peton kaj rezignis sian privilegion.
La nuna proceduro pri la elekto de Episkopoj estas jene: La Nuncio interkonsente kun la Registaro kaj konfidence elektas kaj sendas al la Papo liston de almenaŭ ses kandidatoj. La Papo elektas tri el ili kaj Franco prezentas oficiale unu el tiuj tri elektitaj de la Papo. Se la Papo ne akceptas iun de la kandidatoj proponitaj aŭ eĉ neniu el ili povas propravole fari alian liston de tri kandidatoj kaj Franco prezentas unu el ili al la Papo, se ne estas speciala politika kontraŭstaro; en tiu kazo Franco komunikas tion al la Papo kaj sekvas la dialogo.
Pri tiuj problemoj la opinioj de la hispanaj gazetoj (ĵurnaloj kaj revuoj) dividiĝis kaj eĉ okazis veraj pasiaj polemikoj inter ili, kiuj esprimis la plej kontraŭajn argumentadojn.
En 1966 la Episkopa Konferenco komunikis al la Papo ke la Episkopoj estis pretaj rezigni, tiujn privilegiojn kiujn la Papo konsideru oportuna. Komence la Episkopoj rezignis la privilegion de la « Buleo » koncesiita al Hispanujo, per kiu la Eklezio enspezis ĉiujare 96 milionojn da pesetoj.
Aliparte estis la problemo de la nombro de vakaj Diocezoj, pliigita pro

morto aŭ rezigno de maljunaj Episkopoj. Tiuj Diocezoj restis vakaj dum multaj jaroj aŭ nur estis nomitaj Episkopaj asistantoj aŭ apostolaj administrantoj pri kies nomiĝo ne estas stata privilegio. Kelkaj opinias ke tio estas decido de la Papo antaŭ la konservo de la Privilegio Ŝtata. Sed vere nur la Papo scias...

La 29ª de Aprilo 1968 la Papo sendis leteron al Franco memorante al li la petegon de la Koncilo pri la rezigno de la Privilegio de presentado de Episkopoj al Registaroj kaj kompreneble ankaŭ al Hispanujo, al kiu estis « koncesiita pro la grandaj meritoj religiaj de tiu Nacio, sed kiuj jam ne korespondas al spirito nek al postuloj de la nuntempoj, kaj oni devas lasi al la Sankta Seĝo la liberecon procedi elekton kaj nomiĝon de hispanaj Episkopoj » « ... la Sankta Seĝo siaparte ne havos aliajn celojn ol la religia kaj spirituala prospero, ĉiam pli kreskanta de tiu Nacio tiel amata de Ni, kaj ĉiuokaze la Sankta Seĝo estas preta sindevigi komuniki antaŭe kaj diskrete al la Ŝtatestro aŭ la Registaro la nomon de la estonta Episkopo, kun la celo ekscii se estus politikaj kontraŭstaroj al tiu nomiĝo ». « Ni ne volas preterlasi ĉi tiun okazon sen atesti al Lia Ekscelenca Moŝto la devigan aprecon pro la granda laboro, kiun vi faris por la morala kaj materiala prospero de la Hispana Nacio, kaj pro via efika intereso en la revigliĝo de la katolikaj organizacioj post la ruinoj de la tragika kaj funebra krizo de la civila milito kaj Ni deziras certigi, kun Nia bonvolemo, Nian Apostolan Benon al vi kaj al la tuta fidelega hispana Nacio ».

Al tiu letero respondis Franco per alia letero en kiu diris interalie: « La paterna alvoko de Lia Papa Moŝto, ripetante la petegon faritan tiurilate de la IIª Vatikana Koncilo, trovas tujan eĥon en mia animo de fidela filo de la Eklezio... » « La nuna sistemo, laŭ nia opinio estas akordigebla kun la libereco de la Eklezio... ĝia praktika aplikado estis ĉiam inspirata en la maksimuma respekto al la rajtoj kaj eĉ deziroj de la Apostola Seĝo ». « Aliparte... iu ajn modifo, pro la Jura hispana ordonado, bezonas krom la aprobon de la Registaro, tiun de la Deputitaro aŭ Korteso ». Poste diras ke estas necese revizii samtempe aliajn punktojn de la Konkordato laŭ la orientoj de la « Gaudium et Spes », kiuj povas esti obstakloj por la kristana atesto postulata de la sentema nuna mondo. « En ĉi tiuj cirkonstancoj, nia Registaro, kiel interpretanto de la hispana Nacio kaj kun deziro akcepti la petegon de Lia Sankta Moŝto, estas preta revizii ĉiujn privilegiojn de ambaŭ potencoj laŭ la spirito de la Koncila Konstitucio antaŭdirita, kaj akorde kun la publika Deklaro farita tiurilate de nia Episkoparo ». « Pro la diritaj kialoj kun fila sincereco kaj sen iu ajn persona korinklino al privilegioj nek honoroj kiuj povas maldiafanigi la ateston de mia katolika fido, nek de mia fervora aliĝo al la Katedro de Petro, mi opinias, Sanktega Patro, ke revizio kaj aktualigo de la nuna Konkordato perfektigos, post la Dua Ekumena Vatikana Koncilio, la bonajn rilatojn, kiuj feliĉe ekzistas inter la Eklezio kaj la Hispana Ŝtato ».

La 18-an de Novembro 1968 la Nuncio komunikis al la Episkoparo ke oni decidis oficiale revizii la Konkordaton.

Estas nerefutebla fakto ke la opinioj de la hispanoj estas klare dividitaj pri tiuj temoj: kelkaj opinias ke la nuna Konkordato devas esti konservata ĉiamaniere, sen aldono nek forpreno de io ajn kaj ke ni ne devas rezigni privilegiojn leĝe donitajn aliaj opinias ke oni devas fari tute novan kaj malsimilan Konkordaton ĉar nenio el la malnova estas konservebla; ankaŭ estas opinioj kiuj esprimas la deziron akcepti neniaspecan Konkordaton ĉar ĉiu Konkordato favoras nek al la Eklezio nek al la Ŝtato (en tiu senco deklaris Monsinjoro Dadaglio al kanaria ĵurnalisto ke la Konkordatoj ne estus necesaj se la leĝoj garantius al ĉiuj la plenan ĝuon de ĉiuj homaj rajtoj) anstataŭ

Konkordato oni povas subskribi kontraktojn pri konkretaj diversaj aferoj, kiuj bezonus ilin; finfine aliaj opiniis ke pro tio ke la kanona ĵuro estas reviziata oni devas atenti por ke la Konkordato estu akorde kun la venonta nova kanona ĵuro.

En julio 1970 estis preta en Romo antaŭprojekto de Konkordato farita de hispana Ambasadoro en Romo S-ro Garrigues kaj Monsinjoro Casaroli, kiuj reprezentis la respektivajn vidpunktojn de la hispana Registaro kaj de la Vatikano.

En la antaŭprojekto kaj rilate al nomiĝo de Episkopoj oni povas legi en la artikolo VI: La nomiĝo de Ĉefepiskopoj kaj Episkopoj... estas de la kompetenco de la Santa Seĝo. Antaŭ tiu nomiĝo la Santa Seĝo komunikos al la Hispana Registaro la nomon de la persono elektita por ekscii se estas politikaj kontraŭstaroj al tiu nomiĝo. La Hispana Registaro respondos antaŭ 30 tagoj; ĝia silento supozas ke ne ekzistas obstakloj ».

Kiel oni povas vidi en tiu problemo estas reprenitaj la sugestoj faritaj de la Papo al Franco.

Kelkaj diris ke tiu antaŭprojekto kun 33 artikoloj kaj finala aldono kontentigis neniun. Kompreneble neniu antaŭprojekto estas perfekta kaj la celo de ĉi tiu ne povas esti alia ol elirpunkto por diskutoj kaj plibonigoj. Pro tio la Sankta Seĝo sendis ĝin la Hispana Episkopa Konferenco por ĝia studado kaj revizio. La XIV Asembleo de Episkopoj okazinta la 15an de Februaro 1971 pritraktis tiun aferon, sed kiel « rezervita afero » kaj pro tio sekreta. Iliaj opinioj kaj sugestoj estis senditaj al la Vatikano. Verŝajne oni dezignis Komisionon, kies celo estus dialogi kun Ŝtatestro kaj Papo, kiel perantoj.
Do, nun ŝajnas ke la intertraktadoj kaj preparaj laboroj daŭriĝas.
Ni esperas kaj deziras ke la konkordo regu tiajn dialogojn kaj ke la fina rezulto estu la plej bona por ni, kiel katolikoj kaj kiel civitanoj.

**Fernando de la Puente**

# LA KRIZO NEEVITEBLA

## Otto Maurer

En la Graz'a ĵurnalo « Kleine Zeitung » troviĝis aktuala artikolo de eminenta katolika prelato, kiun mi devis traduki por ĝin mondskale diskonigi per Esperanto; ĝi akcelos la pacon eĉ inter samkredanoj.

**D-ro Adolf Halbedl**

La krizo de la eklezio, kiun nuntempe ni povas konstati, estis same neevitebla kiel neceso por ĝia pluevoluo. Ĝi estis neevitebla tial, ke pro la tradiciana teologio kaj por la hierarĥio de ĉi tiu formita estis atingita tia baro por problemoj, ke tiu ĉi baro devis krevi. La teologio instruita laŭ lerniloj antaŭ la Vatikanum stagniĝis. La moralteologio apenaŭ tuŝis la gravajn moralajn problemojn de la homaro. La liturgio troviĝis en stato de senmoveco.
La laikula problemo estis nesolvita, la virinproblemo en la eklezio tute ne konsciita... La monokrata posteno de la papo post la Vatikanum I estis cementita, teologio de l'episkopeco apenaŭ komencita, speciale tiu pri gvidado de la tuta eklezio...
Novplatona kaj gnostike infektita piecdotrino malebligis malfermitan rilaton de la kristano vivanta en la tiel nomina « mondo » kun la sferoj de la geedzeco, profesio kaj politiko. Precipe la seks-moralo troviĝis sub la diktado de monaĥe orientita klerikular-teologio.

La rilato de l'eklezio kun la moderna socio kaj kun ĝiaj demokratiaj instituaĵoj kaj procedado estis distanca kaj malcerta...
En tiu ĉi situacio la eklezio de la dua vatikana koncilo devus eksplodige efiki precipe en tiuj tradicianaj regionoj kaj sociaj tavoloj ŝirmataj antaŭ la moderna civilizo.
La ordonita unuecteologio, la certeco pri si mem kaj limanta kun la farizeismo, la preskaŭ kompleta malavanco de la profetismo, la strikta disciplinigo de l'eklezianaro kaj la supereco de prijuraj kaj spiritaj idealoj malhelpis la sinkritikon laŭdevan por kristano, kiun la Nova Testamento nomas per la fundamentiga esprimo « METANOIA », kaj lasis same malfoniĝi la taskon de ĉiama reformo kiel ĉi tiuj kriterioj malhelpis la konscion, ke krizoj kaj konfliktoj apartenas al la neevitebla stato de la eklezio kiel la peko... (Sekvos)

* * *

*Tiu ĉi artikolo esprimas la opinion de Otto Maurer kaj de la tradukinto D-ro Adolf Halbedl. Mi ne scias ĉu multaj legantoj akceptas tiun ĉi opinion. Cetere por ni estas tre malfacile juĝi per niaj modernaj kriterioj la plurjarcentan agadon de la Eklezio.* (La redaktoro)

# AKROPOLISO

Triope ni vagis dum sufoka somera vespero en Ateno. De placo Omonia, pere de strato Athinas, direkten al magia punkto de ne nur greka kulturo — Akropoliso. De iu angulo ĝi allumigite aperis majestece kelkmomente tute en lumo, poste iom post iom en ombro troviĝanta — kaŝante parton post parto siajn murojn. Tiu lumludo daŭris; por iuj plia sensensa altiraĵo serve al la turistaro, por malmultaj travivo de greka histori-fluo.
« Haire Ateno; » — kaj « Himen, himenaje o », refrene kantadis dum festotagoj la atena popolo siatempe, vidante Akropolison.
Ni ne kantis. En pli « sobra » tempo vivante, ni unurange serĉis sidlokon en ĉestrata gastejo. « Kion ni trinkos? » — demandis mia kunulo, instruisto. « Por mi bonvolu « Coca-cola-n mendi », respondis la tria en nia grupeto, sinjorino, ankaŭ instruistino. Mi, la tria, ankaŭ kapjesis kaj ni povis daŭrigi interesan teologian interparoladon. Du konvinkitaj protestantoj kaj mi rom-katoliko. Je temoj abundis sed ĉiam ni kvazaŭ bumerange revenis al centra punkto. Inter la sennombraj interpretoj, rozante kvazaŭ en ĝangalo, ni eksilentis.
Kaj subite sekvis eldiro flanke de virino, eldiro ehe sopira, tute ne atendata, komplete ne konforma al ĉio-ajn en nia tempo, ŝokiga: « Estus tamen bone havi Papon! ».
Mi rigardis Akropolis-on, rememore tiumomente staris antaŭ mi eldiro de elstara samkredano « blinda obeo al Romo finiĝis » kaj-komparis!
Mi des pli eksilentis en tiu neforgesebla momento, tiam 1971 dum sufoka, somera vespero sube de Akropoliso. *Rudolf Skoruppa*

**Giovanni Papini**

# LA VERA NASKIĜO

Unu el la plej profundaj vortoj, kiun mi aŭdis pri la Kristanismo, estas: « Eĉ se Kristo naskiĝus mil kaj dekmil fojojn en Betlehemo, nenio utilos al vi, se Li ne naskiĝus almenaŭ unu fojon en via koro ».

Ĉi tiuj du versoj troviĝas en la « Keruba Pilgrimanto » de Angelo Si — lesio, germana evangelisto de la deksepa jarcento, kiu konvertiĝinte al la Katolikismo, fariĝis minora frato kaj granda poeto.

Sed kiel povos okazi tiu interna naskiĝo? Nia animo estas ofte simila al stalo, tiel mallarĝa kaj senluma, tiel plenplena je malpuraĵo, ke vere ŝajnas tute neeble loki en ĝi Dio, eĉ se infaneto.

Tamen tiu miraklo eblas nur se ĝi estas arde dezirata kaj atendata.

Iam, kiam vi ne sentos eĉ iomete da amareco kaj ĵaluzo vid-al-vide al la ĝojo de malamiko aŭ amiko, plezuriĝu, ĉar tiu naskiĝo estas proksima. Iam, kiam vi ne malkovros sekretan, plezuran senton fronte al la malbonŝanco kaj al la falo de la aliaj, konsolu vin, ke la naskiĝo estas tute proksima.

Iam, kiam vin urĝos la deziro porti iom de feliĉo al tristulo, kaj la impulso malpezigi la doloron kaj la mizeron de eĉ unu sola kreito, estu gaja ĉar tuja estas la alveno de Dio.

Kaj se iam vi estos batata kaj persekutata de la malbonŝanco kaj vi perdos sanon, forton, gefilojn, geamikojn kaj devos suferi la stultecon, la malicon, la indeferentecon de la mal — kaj proksimuloj, sed malgraŭ ĉio vi ne fordonos vin al ĝemegadoj, al blasfemoj kaj akceptos kun serena animo vian sorton, ĝojegu kaj triumfu ĉar la miraklo, kiu ŝajnis neebla, jam okazis, kaj la Savanto jam naskiĝis en via koro.

Vi ne plu estas soleca, neniam plu vi estos soleca.

Via senluma nokto ekflambrilos kiel se mil multharaj steloj alvenus de ĉiu direkto de la ĉielo por festi la renkontiĝon de via mallonga homa vivo kun la dia eterneco.

*Traduko de Prof. N. Dell'Aringa*

**Silvano Cola**

# NE ESTAS LA EDZIĜO, KIU DONAS AL LA HOMO LA MATURECON

## La celibato, unu el la problemoj traktitaj dum la Sinodo de la Episkopoj, laŭ la konsidero de psikologo

Mi tute ne intencas enŝoviĝi en la polemikan ludon pri la sacerdota celibato (temo antaŭ nelonge traktita de la Sinodo de la Episkopoj). Mi preferas rekte kaj sincere tuj esprimi mian opinion: la aktuala leĝo rilate la celibaton estas pozitiva leĝo de la Eklezio kaj, do, ĝi povas sperti ŝanĝojn. Tamen ĉiuj teologiaj, ekzegezaj kaj historiaj argumentadoj favore aŭ kontraŭ ĝin povas ja klopodi, maksimume, klarigi kelkajn decidigajn, ideologiajn situaciojn; validigi aŭ malvalidigi prenotajn decidojn; defendi aŭ ne, teologie, la naturajn instinktojn, sed neniam ili povos nei la unikan, esencan fakton, nome, ke Jesuo restis virga, mortis virga kaj, ĉar Li estis ankaŭ sacerdoto, neniu pastro povus esprimi ĉiujn aspektojn de « sia maniero » « esti sacerdoto » se li ne identiĝus kun Li ankaŭ laŭ la virga aspekto.

Pli grave estas konsideri ĉu la celibato vere malpligrandigas la homon, alivorte ĉu la atingo de la plena, homa matureco estas nepre malhelpata de la virgeco, ĉar tiuokaze Jesuo reprezentis mirindan sed ne imiteblan escepton kaj la invito de Jesuo al daŭra virgeco direktita al kiu « povas kompreni » estus evidenta trompo al la homo kaj malbona servo al la « regno de la ĉieloj », kiu fariĝas tiamaniere, abundparte, la regno de la nematuraj.

## Kiamaniere iri al la homa matureco?

Sed kio estas la homa matureco?

Nur la pedagogia psikologio, nome la atenta observado de la laŭnatura psika progreso de la homo, povas doni al ni taŭgan respondon.

Estas sciite, ke iu ajn novnaskito estas tute « egocentra ». Neniu alia, eĉ la plej eta estaĵo, estas en lia senkonscia mondo sed nur liaj efektivendaj bezonoj. Proporcie kiel la infano progresas kaj daŭre kreskas (ĝis la maljuneco kaj la morto) oni rimarkas du kontraŭajn inklinojn:

unuflanke la instinktivan emon, ĉiam ĉeestantan, ĝui la aktualan situacion en konsidero de la pozitivaj, kontentigaj rezultoj jam atingitaj, kaj la timon fronte al la risko de novaj, streĉitaj kaj necertaj ŝanĝoj; aliflanke la infano kaj la plenkreskulo estas puŝataj, per la samaj, vitalaj impulsoj al daŭra transpaso de ĉiu atingita fazo por celi al la iompostioma « memefektiviĝo » riĉa, ŝajne, je pli grand-valoroj kaj, konsekvence, pli novaj kaj kontentigaj manifestacioj.

La infano, kutumiĝinta al la suĉboteleto, kies uzadon li trovas sufiĉe kontentiga, nur se helpata de la plenkreskuloj, li povas forlasi ĝin por atingi pli altan kontentigon (eĉ nur la deziron agi kiel la plenkreskuloj), alie li restus ĉenata al tiu infana formo de simpla bezono, alivorte li restus « malgranda » dependa, neagema. La gepatroj ekzercantaj influon sur lin, helpas al li venki tiun kutimon; estas ankaŭ vere, tamen, ke infano sana spontane celas al venko.

La rezultato fariĝas definitiva ĝuste en la momento kiam li spertas, ke la nova formo de konduto (manĝi kiel la plenkreskuloj) havigas al li pli grandajn kontentigojn, ĉu pro la pli grava aŭtonomio atingita, ĉu pro la aprobo de la aliaj. Tiam la antaŭa formo fariĝas « malpli plaĉa » malpli kontentiga la novan personan maturecon, kaj pro tio ĝi perdas sian allogon dank'al la pli forta emo naskita de la deziro ne plu esti konsiderata kiel suĉinfano.

Tiu dinamiko de la homa evoluo daŭre ripetiĝas dum la tuta vivo. Oni forlasas iajn iamajn kontentigojn ĉar, en ne definita momento oni komprenas, ke la novaj internaj postuloj de la personeco aŭ de la medio, plu ne kontentigas.

## Matura homo estas, kiu kapablas sin doni

Atente observante la normalan evoluon de la persono, oni ekkaptas la gradan tendencon al la individua « asociismo ».

Ĉe la infano, komence tute egocentra, interesiĝanta nur pri siaj helpantoj, estiĝas iompostiome la percepto de la « aliaj », de tiuj kun kiuj li devas vivi kaj fronte al kiaj li estas devigata limigi siajn petojn.

Pli malfrue li rekonas ilin kiel « subjektojn » kaj estas altirata de nova formo de konduto donanta al li pligrandan, personan « kompletan » kontentigon: la eblecon doni kaj servi al la aliaj. Ĉiu psikologo, pedagogo aŭ mensa higienisto nepre akordiĝas por aserti ke la homa matureco estas proporcie al la povo daŭre starigi pozitivajn rilatojn kun la aliaj kaj kun la medio, bone komprenante ke pozitivaj rilatoj signifas kapablecon sin doni, konstruan komuniiĝon.

*Tradukis Prof. N. Dell'Aringa*